

La Progreso

REDACTIE-
COMITÉ

G. P. DE BRUIN
G. J. DEGENKAMP
F. FAULHABER

**STUDIËBLAD VAN DE BOND
VAN ARBEIDERS-ESPERANTISTEN**
IN HET GEBIED VAN DE NEDERLANDSE TAAL
f 1.75 per Jaar f 1.25 voor leden van F.L.E.
Postgiro 113311

W. F. KRUIT
H. KUYT
JAC. LEM JR.
H. VAN LIER
J. VAN SCHEEPEN
H. VELTHOVE

REDACTIE EN ADM.: G. J. DEGENKAMP, ROELANTSTRAAT 4, AMSTERDAM-W.

VE, LA BONA MALNOVA TEMPO FORPASIS!

„Sennaciulo” surprizis nin en sia marta numero per artikolo de s-ro M. de Waard, sub la titolo „Ĉu Esperanto estas facila?” kies tuta enhavo estas lamentado pri la gramatikistoj, kiuj per siaj multaj reguloj malfaciligis Esperanton. La sola frazo, kiu mankis al ĝi, estas la finplendo: Ve, la bona malnova tempo forpasis, en kiu Esperanto estis ankoraŭ lernebla por ordinara laboristo!

Sed la sola, kio plene klarigis al ni el lia artikolo, estas, ke s-ro de W. ne havas eĉ etan komprenon pri la ideo „lingvo”. Evidente li ne scias, ke lingvo havas du aspektojn. Unuparte ĝi estas interkomunikilo de ĉiuj homoj, eĉ de la plej nekleraj; kaj tiun rolon lingvo plenumas, eĉ se ĝi estas uzata kun svarmantaj eraroj gramatikaj kaj stilaj. Sed duaparte lingvo estas pli malpli nature evoluanta instrumento por esprimi la plej delikatajn ideojn kaj sentojn precize kaj logike, ĉar ĝi estu uzata ankaŭ en sciencoj, literaturo kaj tekniko.

Ĉu la intelektularo akceptus Esperanton, se ĝi montriĝus uzebla nur por ordinara konversacio? Kiom fekundan terenon ni lasus al la reklamo de Ido kaj Occidental, ignorante tiun duan aspekton! Tiukaze ni pruvus, ke Esperanto estas malsupera al modernaj lingvoj, ke ĝi estas nur helplingvo!

Por s-ro de W. Esperanto estu prefere la lingvo lernebla en minimumo da tempo, kaj li bedaŭras, ke jam forpasis la tempo, en kiu sufiĉis la 16-regula gramatiko. Sed evidente li ne scias, ke tiutempe Zamenhof nepre bezonis tiun reklamon por akcenti la facilecon de Esperanto, sed ke nuntempe oni demandas ne nur, ĉu Esperanto estas facile lernebla, sed ankaŭ, ĉu ĝi estas uzebla por ĉiuj celoj.

Nepre malprave li riproĉas la gramatikistojn, ke ili puŝis la evoluon de Esperanto en la malĝusta direkto: de simpleco al komplikeco. Vero estas, ke antaŭ jardekoj oni ĝenerale aplikis la lingvajn regulojn (ne nur Esperantajn, sed precipe ĝenerale agnoskatajn) nekonsekvence, senorde, sensisteme. Kaŭzis tion unue neĝisfunda ellerno de la lingvaj principoj, kaj due la diversaj nacilingvaj influoj. Inter Esperanto unuflanke kaj la naciaj lingvoj aliaflanke ekzistas certaj diferencoj, distancoj; kaj en ĉiu lingvo la gramatikistoj bezonis verki diversajn regulojn, ne por Esperanto mem, kion s-ro de W. erare kredas, sed por transponti tiujn distancojn. Ili ne kreis regulojn, nur konstatis regulojn neskribitajn, donante al ili formojn instruacele. Multaj malfaciloj de Esperanto ja fontas ne en tiu lingvo, sed en la respektivaj lingvoj naciaj.

Malŝate s-ro de W. aludas pri la „dikega grammatiko „Tra la labirinto”. Pri la titolo mem oni povas havi opinion alian ol ĝia aŭtoro, sed malŝata aludo pri ĝia tendenco montras mankon pri sana lingva koepto. Ĉu s-ro de W. forgesis, ke Zamenhof mem verkis siajn „Lingvaj Respondoj” kiel komenton al siaj propraj reguloj? Se Zamenhof vivus ankoraŭ, ni eble disponus pri pli multaj tiaj „respondoj” ol povus enhavi „Tra la labirinto”! Kaj ĉu s-ro de W. mem ne kontribuis al tiu „plikomplikiĝo” de la lingvo per siaj studoverketoj? Ankaŭ ili enhavas pli ol la iama lernolibro „Esperanto en dek lecionoj”!

Iom ridiga estas lia kompato al ni, laboristoj, „niaj neinstruitaj gekamaradoj”, kiun ni afable malakceptas, ĉar tian kompatojn ni ne bezonas. Al tiuj inter ni, kiuj pro nesufiĉa instruiteco ne sukcesas akiri diplomon, jam sufiĉas la akiritá scio, kiun

POR KOMENCANTOJ

H. Kuyt.

Vertalingen zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 4. Vertaal in Esperanto. De voorwaardelijke wijs.

Ieder jaar organiseert onze bond een congres in één der steden in het gebied van de nederl. taal. Dit jaar vindt het congres plaats in Heerlen. Als ik tijd had, ging ik er zeker heen; maar helaas, ik kan er geen tijd voor vinden. Dat betreur ik zeer, omdat zulke congressen zo leerzaam zijn. Als ik het volgend jaar tijd heb, zal ik deelnemen aan het congres, waar het ook is. Als de reiskosten niet zo hoog waren, gingen veel meer esperantisten naar Heerlen. Gelukkig vinden deze congressen nu eens hier, dan weer daar plaats. Daardoor kan iedereen van tijd tot tijd aan zo'n grote bijeenkomst deelnemen.

Vertaling van opgave 2.

LA LUPO KAJ LA ŜAFIDO.

Lupo renkontis ŝafidon ĉe rivereto. La lupo deziris¹⁾ formangi la ŝafidon²⁾. „Kiel vi kuraĝas malpurigi³⁾ la akvon?“ ĝi⁴⁾ diris. „Mi nun ne povas trinki ĝin.“ „La akvo fluas de vi al mi“, la ŝafido diris, „do mi ne povas malbonigi vian trinkaĵon⁵⁾“. „Eble vi pravas⁶⁾“, rediris la lupo, „sed antaŭ unu jaro vi kalumniis⁷⁾ min“. „Antaŭ unu jaro mi ankoraŭ ne⁸⁾ estis naskiĝinta⁹⁾“, la ŝafido diris. „En tiu okazo¹⁰⁾ ĝi¹¹⁾ estis via patro“, la lupo kriis, saltante¹²⁾ al la kompatinda¹³⁾, senhelpa ŝafido, kaj formangis ĝin.

1) Ook: *volis*. 2) Niet zonder *n*; men heeft te doen met een rechtstreekse bepaling, d.i. een bepaling zonder voorzetsel. 3) Ook: *malklarigi*. 4) Niet: *li*; als het natuurlijk geslacht niet bekend of van geen belang is, gebruike men het pers. voornaamw. *ĝi*. 5) Niet: *trinkadon*; met „drinken“ wordt hier niet de handeling bedoeld, maar het water dat zal worden gedronken. 6) Te woordelijk vertaald is: *ĉio estas bona*. 7) Minder goed is *ofendis*, *mokis*. 8) Ook: *ne jam*. 9) Niet juist is: *naskiĝis* = werd geboren. 10) Niet: *tiam*; het nederl. woord „dan“ heeft hier geen betrekking op tijd. 11) Hier is geen sprake van een onpersoonlijke zin; dus moet hier een onderwerp gebruikt worden. 12) Niet aan te bevelen is: *kaj kun tiuj vortoj*; juist in deze zin maakt een bijwoordelijk deelwoord de stijl vlot. 13) Niet: *malfeliĉa*.

Men verwaarloze vooral de leestekens niet. Gesproken woorden komen tussen aanhalingstekens te staan, waarna dan een komma of puntkomma wordt gebruikt voordat men de zin aanvangt.

Dem.: La febr. n-o de L.P. donas kiel tradukojn por „zakelijk“: afer(em)e, koncize, objective. Ĉu „aferece“ ne estas taŭga vorto?

Resp.: Certe, ankaŭ! Oni tamen atentu, ke la finaĵoj „eca“ kaj „ece“ lastatempe akiras tendencon, kiun „ec“ laŭsence ne havas: oni uzas ilin por formi vortojn, per alia sufikso neformeblajn, kaj ofte eĉ superflue, ekz. „kamaradece“ anstataŭ „kamarade“.

ili utiligas konversacie kaj koresponde. Sufiĉas al ili la unua aspekto de la lingvo. Sed al tiuj, kiuj havas la kapablon lerni pli ekzakte, ne sufiĉas elementa scio; ili profundiĝas en la lingvo, emancipiĝas en kaj per ĝi, sentante sin eĉ fieraj, ke almenaŭ unu lingvon ili kapablas ellerni kaj uzi sengene kaj senskrupule. Ili konvinkiĝis, ke Esperanto estas lingvo en la vera senco, egalvalora al lingvoj naciaj. Ili komprenas ankaŭ ĝian duan aspekton.

*Kaj kial s-ro de W. mem ne aplikas en sia artikolo nur la „simplan Esperanton“ el la deklecionaj lernolibroj? Male, ankaŭ li, ignorante la regulojn de la damnindaj gramatikistoj, tamen ilin obeas. Li sciu, ke ni jam ne bezonas kelkpaĝajn lernilojn, sed deziras studi la lingvon ĝisfunde. Per Esperanto la laboristaro emancipiĝas, kaj ĝi ne toleras esti rigardata kiel esperantistaro duaranga!

DE KOMENCANTO AL PROGRESANTO

Jac. Lem.

Opgave 4. Vertaal in Esperanto:

1. Kunt ge de oppervlakte (*areo*) en de omtrek (*perimetro*) van een cirkel berekenen? 2. Op karakterloze mensen kan men nimmer rekenen („rekenen op” betekent: zich verlaten op, zijn vertrouwen stellen in). 3. Rekening houdende met (vertaal: in overweging nemend) de omstandigheden, raden wij u aan voorzichtig te werk te gaan (te werk gaan = *agi*). 4. Wij verzoeken u dit bedrag te storten (*deponi*) op onze girorekening (*konto de . . .*). 5. Gij zult niet stelen! Vrienden, gij moet nu eens goed opletten! Wees zo goed een beetje op te schikken (*flankenŝoviĝi*). 6. Het is mooi weer; laten wij (gaan) wandelen en van de natuur genieten. 7. Gij moet wel bedenken, dat zulk een onderneming niet zonder gevaar is. 8. In antwoord op uw brief delen wij u mede, dat wij het geld u per postwissel zullen overmaken (*sendi*). 9. Ik verzeker u, dat hij al het mogelijke deed om de onderneming te doen slagen. 10. Wij hebben ons verzekerd tegen brand en inbraak. 11. Zonder zich te bedenken sprong het moedige meisje in het water en greep den drenkeling; enige ogenblikken daarna stonden redster en geredde op de wal. 12. Niemand is onfeilbaar; hij die werkt, maakt fouten. Dit te bekennen is geen schande.

Vertaling van opgave 3.

1. Mia bofrato skribis al mi, ke li baldzŭ (post nelonge) venos en Amsterdam(on) kaj kunportos la libron, petitan de mi (la de mi petitan libron). 2. Ho, kiom hazarde, mi estis ironta al vi, kaj nun vi venas al mi (ĉe mi). 3. Se mi estus sciinta, ke vi estas malsana, mi certe ne estus ĝeninta vin. 4. Li ne povis ne konfesi sian krimon, ĉar ĉio atestis kontraŭ li. 5. Fraŭlino (needziniĝinta virino), havanta siajn okupojn eksterdome, serĉas meblitan ĉambron. 6. Perdinte siajn ĝepatrojn, la fraŭlino (knabino) luis meblitan ĉambron ĉe unu el siaj konatoj (konatuloj). 7. Bonaj libroj estas viaj bonaj amikoj. 8. Ne ĉion rakontu al la unua renkontito. 9. Unue vidi, poste pripensi kaj nur tiam paroli. 10. Ni ĝuste atingis (estis atingintaj) nian domon, kiam ekneĝis. 11. Kiam li aŭdis (aŭdante) tion, li ekploregis. 12. Oni rakontis al li, ke li perdis (estas perdinta) sian tutan havaĵon; tiam li ekploregis kaj malespere tordis la manojn.

HET SCHRIJVEN VAN TELWOORDEN.

Hier volgt de vertaling van de telwoordenopgave uit het vorige nummer: dek tri, dek-triono, la dua duono, dudek-kvara, kvare, dek-unue, kvarcent sepdek, kvarcent-sepdeka tago, mil naŭcent kvardek sep, la jaro mil-naŭcent-kvardek-sepa, kvaroble kvar estas dek ses, kvar kaj kvarono, kvar kaj tri kvaronoj, unu kaj duono, unu kaj duona jaroj, multoblo de ses, trifoje sonorigu, dufoje pagi, duoble pagi, la dek-unua eldono, la tridek-unua tago, tridek unu tridek-trionoj, dek du dividite per (de) kvar estas tri, unu dividite (-a) per (de) du estas duono, la dek-kvina(n) de marto mil-naŭcent-kvardek-sepa, cent sepdek kvin cendoj estas unu kaj tri kvaronaj guldenoj, cent kvar malpli (minus, sen) okdek unu estas dudek tri, (unu) monato estas dek-duono de jaro, (unu) tago estas tricent-sesdek-kvinono de jaro, vi prenu la unuan parton, tiam (do) mi prenos la duan, kaj (sekve) ankoraŭ unu parto restos.

POR PROGRESANTOJ

J. van Scheepen.

Vertalingen voor deze rubriek zende men voor de 10e van de volgende maand aan het redactie-adres Roelantstraat 4, Amsterdam-W.

Opgave 6 Vertaal in Esperanto:

Sinds enkele eeuwen begeleidt het boek de mensheid, sinds minder dan een eeuw begeleidt het boek ook het leven van haast elke west-europese mens.

Wie enkel vermaak zoekt en ontspanning, vindt in duizenden goed of slecht geschreven, goed of slecht vertaalde, goed of slecht gedrukte romans en verhalen de tijdelijke vergetelheid, die hij begeert. Waarom zouden wij onszelf en anderen het misgunnen, om na een dag van hard en ingespannen werk, de eigen zorgen te vergeten in de avontuurlijkheid van een ander bestaan? Misschien zullen wij de streken nooit bereizen waarheen de schrijver ons voert; maar zijn we er al niet?

Dr. Garnt Stuiveling.

Opgave 7.

1. Barelo malplena sonas plej laŭte.
2. Stari per unu piedo en la tombo.
3. Post vetero malbela lumas suno plej hela.
4. Kiu venas plej frue, sidas plej ĝue.
5. Kun la peko en la mano.

Vertaling van opgave 3.

PRINTEMPO.

Ce marborda¹⁾ promeno en la printempo — tio estas do dum la tempo, kiam²⁾ la bordo³⁾ estas ankoraŭ ne tute kovrita de⁴⁾, banantaj kaj sunĝuantaj⁵⁾ vizitantoj — oni povas ofte surprizi la naturon, kiam ĝi tute kviete⁶⁾ okupiĝas per konstruado al nia kontraŭmara defendaĵo. La allanda⁷⁾ vento kunblovas⁸⁾ de la larĝa malflusa⁹⁾ bordo la sekiĝintajn¹⁰⁾ liberiĝintajn sablerojn kaj malantaŭ aŭ ĉirkaŭ ĉia¹¹⁾ objekto, sed precipe ĉirkaŭ la malmultaj (planto) kreskaĵoj, kiujn oni trovas sur partoj de la bordo al ili konvenaj, formiĝas tre malgrandaj dunoj. Ili plej ofte ne restas, sed ekzistas lokoj, kie ĉi tio¹²⁾ okazas (ekz. inter Oostvoorne kaj Rockanje, ie kaj tie ankaŭ sur la Wadden-insuloj!) kaj tiam ili povos kreski ĝis veraj dunoj. Tiel kreskis ĉiuj niaj dunoj.

C. v. R.

1) Ook: *strando, plaĝo*. 2) Niet: *ke*. 3) Men kan gerust het eerste lid van dergelijke samenstellingen bij verdere toepassing weglaten. 4) Niet: *per*. 5) *Sunbanantaj* kan ook, doch is niet mooi na *banantaj*. 6) „In alle stilte” betekent hier: geheel rustig. 7) Ook: *elmara*. 8) Ook: *kunventas*, maar dan niet na *vento*. 9) „Eb en vloed” wordt ook wel vertaald met *alfluo kaj forfluo*. 10) Beter dan: *sekiĝitajn*. 11) Ook: *ĉiu ajn*. 12) Niet: *jes okazas*. Als men „wel” wil vertalen, dan kan men dat doen door *tamen* of *reale* te gebruiken.

Dem.: Kiel ni traduku la esprimo „zoveel maal zo....” of „zoveel maal meer dan....” ekz. en: „De toren is vijfmaal zo hoog als ons huis” kaj „De toren is vijfmaal hoger dan ons huis”?

Resp.: Inter ambaŭ esprimoj ekzistas konsiderenda diferenco: [De toren is vijfmaal zo hoog als ons huis (De hoogte van de toren is het vijfvoud van die van ons huis) = La turo estas kvinoble tiom alta, kiom nia domo.

De toren is vijfmaal hoger dan ons huis (De toren meet, behalve de hoogte van ons huis, nog het vijfvoud daarvan; in het geheel dus het zesvoud!) = La turo estas kvinoble pli alta ol nia domo.

„PETI AL” AŬ „DE”

Kun granda atento leginte la artikolon „Is dat zo beslist fout?” en la januara numero de L.P., en kiu vi oponas kontraŭ mia opinio pri la uzado de „peti” kaj ties komplementoj, mi sentas, ke ni rezonas krucmaniere kaj sekve ne povas renkonti unu alian. Vi ne povas levi la malgrandan paragrafon pri „peti”, kiun mi verkis en „Kristana Gazeto”, el la kadro de la artikolserio, en kiu ĝi aperis.

En tiuj artikoloj mi provis pruvi, ke la divido de la diversaj verbaj objektoj laŭ ilia logika funkcio valoras neniom aŭ preskaŭ neniom en Esperanto, sed ke la sola valida divido estas tiu laŭ la formo, do en *rektajn* kaj *nerektajn objektojn*. Mi konstatis, ke ankaŭ en ĉi tiu materio Zamenhof havis genian komprenon pri la ĝenerala evoluo de la homa lingvo. Nome: en ĉiuj „modernaj lingvoj” ni vidas la saman principon: oni ne plu distingas la diversajn objektojn, sed pli kaj pli la t.n. kazoj eluziĝas aŭ elmodiĝas por cedi sian lokon al unu „komuna kazo”: Zamenhof uzis post „peti” rektan objekton kaj por persona kaj por aja objekto. Mia opinio li faris tion ne sub influo de rusaj lingvokutimoj, sed laŭ konscia prefero en akordo kun sia principo: „Oni povas uzi akuzativon ĉiam, kiam la senco permesas tion, kaj tia objekto akuzativa povas esti uzata kiel subjekto en pasiva frazkonstruo”.

Kiam „peti” estas samtempe sekvata de du objektoj, unu el ili indikas personon, la alia aferon. En tia okazo oni povas:

1e. Uzi rektan person-objekton kun nereкта pri-objekto: *Li petis min pri sia libro.*

2e. Uzi rektan afer-objekton. Tiam la person-objekto indikas la devenon de la petita afero, kaj do logike postulas la prepozicion „de”: *peti ion de iu.*

La uzadon de „al” en tiu lasta okazo mi rigardas sekvo de naciaj influoj. Ankaŭ en nia nederlanda lingvo ni uzas „dativon” post „peti”, kvankam ankaŭ ĉe ni la dativa objekto preskaŭ ne plu estas sentata kiel dativa, kio estas pruvita per la fakto, ke pli kaj pli tiu objekto estas uzata kiel subjekto en pasivaj frazkonstruoj: „Wij werden verzocht heen te gaan”.

Tio instigis min skribi, ke la uzado de „al” estas nepre erara. Ke oni povus uzi „al” pro la multsignifeco de „de” estas alia temo.

Vi jam rimarkis, ke mi ne klasas la verbon „peti” inter verbojn kiel „preni, ŝteli, rabi” k.t.p., kiel vi supozis.

Mi alproksimiĝas al la temo el tute alia direkto ol vi, kaj tio kaŭzis miskomprenojn. Esperante, ke tiu ĉi malgranda letero klarigu mian vidpunkton. H. A. de Hoog.

La refuto de s-ro De Hoog neniel ŝanĝas nian opinionon, esprimitan en la januara numero de L.P.: ĝi ne havigas novan vidpunkton por rekonsidero. Efektive, la divido de la diversaj verbaj objektoj laŭ ilia logika funkcio ne valoras tiom multe, kiom oni ĝenerale opinias; kaj ni partoprenas la konkludon de s-ro De Hoog, ke la plej ĝusta divido estas tiu laŭ la formo: en *rektajn* kaj *nerektajn objektojn*. Sed ankaŭ al tiu kaŭforma divido oni ne atribuu tro grandan signifon, neglektante la logikon. Ekz. en la frazo „Mi petas, ke vi faru tion”, la propozicio „vi faru tion” estas pasiva objekta propozicio; kaj el ĉiuj objektoj oni prefere elektu la pasivan (laŭ ĝeneralaj modeloj en la praktiko) por la akuzativa formo. Pli natura estas „mi rakontas ion al vi” ol „mi rakontas vin pri io”.

Flanke de tio ni tamen konstatas, ke s-ro De Hoog nia opinio, do malgraŭ sia propra konkludo atribuas kelkokaze eĉ tro grandan signifon ĝuste al la logika senco, kvankam en direkto kontraŭa al la nia. La verbo „peti” okupas kvazaŭ mezan lokon inter la grupo „diri, montri, rakonti, deziri, skribi, certigi” (diri ion al iu) kaj la grupo „ŝteli, rabi, preni, postuli” (preni ion de iu), ĉar peto estas ago direktita al iu, sed kun la rezulto, ke la petita afero devenas de iu.

La esenca diferenco inter la vidpunkto de s-ro De Hoog kaj la nia estas, ke li atribuas la precipan valoron al la rezulto de la ago „peti” (la deveno de la petita afero), kaj ni al la ago „peti” mem, kiun oni direktas al iu, same kiel diron, parolon, deziron. Pro tiu dusenceco de „peti” ni, kvankam preferante „al”, ne permesas al ni nomi „de” erara. Same s-ro De Hoog, preferante „de”, ne rajtas nomi „al” erara. Persona prefero, kiom ajn forte bazita sur logiko, lingvistika aŭ kia ajn alia konsidero, ne ekskluzivu preferon alian. Al pluraj elementoj de la gramatiko oni povas proksimiĝi el direktoj diversaj kaj veni al diferencaj konkludoj. Irante en iu direkto, oni tamen ne perdu elokule, ke aliaj iras en direkto alia ankaŭ kun alia rezulto!

La supozo, ke uzo de „al” post „peti” estas nacidevena, ŝajnas al ni erara. Male, nacia deveno havas la akuzativo post „peti”. Ni lasis nin gvidi ne de naciaj konceptoj, sed de la logiko. Ankaŭ en la nederlanda lingvo oni preskaŭ ne sentas

LA MALBONA . . . REFORMANTO

Nin atingis la Esperanto-tradukó de „La Malbona Suvereno”, fabelo, verkita de H. C. Andersen kaj tradukita de H. P. Frodelund. Kvankam la rakonto ampleksas nur kelkajn paĝojn, ni opinias necesa diri ĉi tie kelkajn vortojn pri la traduko.

Esperanto estas ankoraŭ en sia evolua stadio. 60 jaroj signifas ne longan tempon por iu lingvo. Sed en tiu mallonga tempospaco oni klopodis jam plurfoje „perfektigi” la lingvon, ne nur prezentante reformojn, sed ankaŭ aplikante ilin. Sed kion diris al ni la praktiko? Ke la tempo ne estas matura por io tia kaj ke la nuntempaj (kaj antaŭaj) esperantistoj rifuzis ĉiajn ŝanĝojn. Ja Zamenhof mem diris, ke nur poste, kiam la lingvo estos ĝenerale uzata, oni unu fojon por ĉiam faru tiujn ŝanĝojn, kiujn oni tiam juĝa necesaj. Kial do oni kelkfoje klopodas altrudi al ni iun Esperanton, kiu estas nur bastarda formo de la originala?

Ĉu estas tiom necese, ke ni skribu „h” anstataŭ cirkumflekson? Kaj kie restas la fonetiko, se oni skribas „q” anstataŭ „kv”? Ĉu ni skribu „aqo” en la loko de la kutima „akvo”?

Ĉiu ŝanĝo havu avantaĝojn, sed ni ne sukcesis trovi ilin en ĉi tiu traduko.

Vortoj, kiaj: *mikra*, *kirko*, *ruro* k.t.p., ne rilatas rekte la fundamentajn principojn, kvankam ni opinias ilin nebezonataj. Sed la proponataj reformoj kreas novan (skriban) lingvon flanke de Esperanto, kaj tion ni evitu!

„Qankam la fabelo, verkita de Andersen, belas, tia ĝi estas exemplo de ne sek-venda lingvo (ĉu „lingvo”?) kaj ĝi shajnas al ni bato en la „vakua” aero.”

J. van Scheepen.

Dem.: En „Tra la jaro”, pĝ. 231, oni instruas, ke el adjektivo oni povas derivi verbon, kaj tiam *-i* signifas *esti -a*. Ĉu ĝuste? Ĉu „*mi sanas*” estas egale bona kiel „*mi estas sana*”?

Resp.: El iu adjektivo ni povas derivi verbon, sed nur ne ofte: ni sentas bezonon por tion fari. La senco de tia verbo tamen ne estas precize *esti -a*, sed la eco kvazaŭ esprimiĝas per ago. Komparu: la muro estas flava” kaj „la muro flavas pro la ora sunlumo”. Kaj: „li estas kuraĝa, sed tiumomente li ne kuraĝis ion entrepreni”. „*Mi sanas*” = mi estas ne nur sana, sed el miaj agoj, sinteno, konduto klare pruvigas la saneco.

Dem.: Kial oni tradukas „pet” per „ĉapo”? Laŭ P.V. „ĉapo” ne havas vizieron. Ĉu de pli ĝusta „kaskedo”?

Resp.: Elektive; la uzo de „ĉapo” por „pet” fariĝis kutimo, sed ĝi ne estas ĝusta. La ĝusta vorto estas „kaskedo”.

Dem.: „Koster” oni tradukas per „sakristiano”; ĉu ne ekzistas pli ĝusta vorto?

Resp.: Anstataŭ „sakristiano” oni uzas ankaŭ „pedelo”, kvankam la signifo de „pedelo” estas pli vasta; origine pedelo (latine: *bidellus*) estis juĝeja aŭ universitata servisto.

Dem.: Ĉu estas ĝuste, ke la vorteto „po” ne estas prepozicio, sed konjunkcio, kiel kelkaj instruas?

Resp.: Ĝenerale oni konsideras „po” prepozicio, kaj laŭ tiu koncepto prefere uzas post ĝi nominativon. El ĝenerale lingvistika vidpunkto ĝi tamen estas nek prepozicio, nek konjunkcio, sed adverbo, kio montriĝas el du faktoj: unue, ĝi estas anstataŭigebla per alia adverbo, neniam per prepozicio (ili ricevis po (proksimume) dek guldenojn); due, „po” estas uzebla eĉ antaŭ subjekto (ĉirkaŭ la tabloj sidis po dek personoj).

LA LIBRO-SERVO LIVERAS:

La Forto de l' Vero, de Adi, facilstila romaneto por komencantoj f 1.65.

La Vivo de Zola, A. de Silva, el la portugala lingvo tradukis M. de Freitas f 1.55.

plu la dativan sencon de „peti”, el kio rezultas la formo „oni estas petata”, cetere sufiĉe malbela.

Oni rimarku krome, ke ekzistas subtila diferenco inter „peti ion” kaj „peti pri io”. En la dua esprimo la peto koncernas neĉiam la tutan aferon, sed ofte jam sufiĉa parto de ĝi.

Fine, ni ne asertis, ke estas preferinde uzi „al” precipe pro la multsignifeco de „de”. Ni nur menciis tiun multsignifekon, intence en la fino de nia artikolo, ĉar, kiom ajn grava ĝi estas en la praktiko, ni ne volis bazi sur ĝi ian teorion: ĝi ne povas havi influon gramatikan aŭ logikan.

Red.

ESPERANTO EN LA PRAKTIKO

H. Velthove.

P.: Karel, heb je dat meetkunde-vraagstuk al opgelost, dat de som van de hoeken van een driehoek gelijk is aan een gestrekte hoek?

K.: Nou Piet, dat is toch een doodeenvoudige eigenschap?

P.: Ik vind dat zo eenvoudig niet. Ik heb me er gek op zitten prakkiseren.

K.: Ach jong, eigenlijk hoef je niet eens een bewijs te zoeken, want denk maar eens aan de eigenschap van verleden week, die Jan op het bord moest bewijzen.

P.: Die weet ik niet goed meer.

K.: Wacht, ik zal hem je even voordoen.

P.: Karlo, ĉu vi jam solvis la geometrian problemon, ke la sumo de la anguloj de trilatero¹⁾ egalas duortan²⁾ angulon?


Nu Petro, tio estas ja tute simpla (geometria) propreco.

Mi ĝin opinias ne tiom simpla. Mi ĝisfreneze cerbumis pri ĝi.

He vi, fakte vi eĉ ne bezonas serĉi pruvon, ĉar memoru nur la proprecon de pasinta semajno, kiun Johano devis pruvi (per skribo) sur la nigra tabulo.

Tiun mi ne plu bone scias.

Momenton, mi montre skribos ĝin por vi.



Gegeven: Een willekeurige driehoek ABC.

Te bewijzen: Een buitenhoek van een driehoek is gelijk aan de som van de niet aanliggende binnenhoeken. Dus:

$$\angle A + \angle B = \angle BCD.$$

Bewijs: Trek door punt C een lijn CE//AB, dan is $\angle A = \angle C_2$, want het zijn overeenkomstige hoeken.

$\angle B = \angle C_1$, want het zijn verwisselende binnenhoeken.

Hieruit volgt dus, dat $\angle BCD = \angle A + \angle B$.

P.: Ja, nou snap ik 'em, maar wat heeft dat met het bewijs te maken, dat de hoeken van een driehoek samen 180° zijn?

K.: Nou sufferd, zie je dat dan nog niet?

P.: Oh wacht, ik zie het. Dat de som van de hoeken van een driehoek gelijk is aan een gestrekte hoek volgt uit het vorige bewijs, want

$$\angle A + \angle B + \angle C_3 = \angle C_1 + \angle C_2 + \angle C_3 = 180^\circ.$$

K.: Juist. Er is ook nog wel een ander bewijs, maar er is er maar een gevraagd.

1) Ankaŭ „triangulo”.

2) Orta angulo = rechte hoek.

3) Por sciigi la Esperantajn terminojn ni ne uzas la internaciajn simbolojn en la Esperanta teksto.

Konigo: Arbitra trilatero ABC.

Pruvendo: Ekstera angulo de trilatero egalas la sumon de la neapogaj (ne suplementaj) internaj anguloj. Do: Angulo A plus angulo B egalas angulon BCD³⁾.

Pruvo: Desegnu tra punkton C linion CE paralele je latero AB, tiam angulo A egalas angulon C_2 , ĉar ili estas konformaj anguloj.

Angulo B egalas angulon C_1 , ĉar ili estas inversaj internaj anguloj.

El tio do rezultas, ke angulo BCD egalas angulon A plus angulon B.

Vere, nun mi komprenas ĝin, sed kiom tio koncernas pri la pruvo rilate la angulojn de trilatero, ke ili sumiĝas 180 gradoj?

Vi stultulo, ĉu vi ankoraŭ ne rimarkas tion?

Ho jen, mi ekscias. Ke la sumo de la anguloj de trilatero egalas duortan angulon aŭ 180 gradojn, rezultas el la antaŭa pruvo, ĉar

angulo A plus angulo B plus angulo C_3 egalas angulon C_1 plus angulon C_2 plus angulon C_3 egalas 180 gradojn.

Guste. Ekzistas ankaŭ alia pruvo, sed oni postulis nur unu.

DE WERKWOORDEN

WEDERKERENDE WERKWOORDEN (REFLEKSIVAJ VERBOJ).

Ieder esperantist is ervan overtuigd, dat de meeste moeilijkheden in Esperanto eigenlijk geen moeilijkheden van Esperanto zijn, maar haar oorsprong vinden in de nationale talen. Wanneer men van kindsaf geen andere taal geleerd zou hebben dan Esperanto, dan zou blijken, dat men de taal veel beter beheerste, dan nu gewoonlijk het geval is, omdat men dan in het toepassen van de taal niet onophoudelijk belemmerd werd door nationale, dus onlogische gewoonten, regels en invloeden.

Een der onderdelen van de taal, waarin de studerende het meest te kampen heeft met het overwinnen van invloeden uit zijn moedertaal, vormen voorzeker de wederkerende werkwoorden. Bij het bestuderen dezer werkwoorden gaat men in het leerboek meestal uit van het begrip „wederkerend”, zoals de betreffende nationale taal dat kent. En dit vertroebelt de juiste opvatting van dit begrip. We zullen daarom in dit hoofdstuk eerst het begrip „wederkerend” bepalen, zoals dat in Esperanto bestaat, dus zoals het logisch is, en het daarna vergelijken met datzelfde begrip in onze Nederlandse taal.

1. Het begrip wederkerendheid.

Wederkerendheid in een werking wil zeggen, dat de werking, die het onderwerp verricht, op datzelfde onderwerp overgaat, d.w.z., datzelfde onderwerp weer tot voorwerp heeft, bijv.: *mi lavas min, li razas sin, ŝi kombas sin, ili helpas sin, vi rigardas vin* e.d.

Het spreekt vanzelf, dat werkwoorden wederkerend gebruikt altijd overgankelijk moeten zijn; immers, een onovergankelijk werkwoord gaat op geen voorwerp over, kan dus ook niet het onderwerp tot voorwerp hebben.

Nu kan men vele werkwoorden wel in tweeërlei zin wederkerend gebruiken, n.l., door het onderwerp als lijdend voorwerp te gebruiken, zoals in bovenstaande voorbeelden gedaan is; en vervolgens, door het onderwerp als belanghebbend voorwerp toe te passen, bijv.: *mi prezentas al mi, li faras al si penon, ŝi aĉetis por si ĉapelon*. Ditzelfde gebeurt in het Nederlands, alleen met dit verschil, dat men bij het belanghebbend voorwerp geen voorzetsel nodig heeft: *hij gaf zich moeite, zij kocht zich een hoed*.

Geen enkele moeilijkheid ligt hierin opgesloten, en, ware onze moedertaal in dit opzicht even logisch, het begrip „wederkerend werkwoord” kon gerust onbesproken blijven, want het spreekt voldoende voor zichzelf.

2. Wederkerende werkwoorden naar de vorm.

Maar hoe staat het nu in het Nederlands met deze werkwoorden?

In onze taal onderscheidt men twee soorten wederkerende werkwoorden. De eerste zijn de werkwoorden, die wederkerend zijn naar hun betekenis, dus precies dezelfde als de hierboven genoemde in Esperanto. Maar de tweede groep vormen de werkwoorden, die alleen wederkerend zijn naar de vorm. Dit zijn dus werkwoorden, waarbij het wederkerend voornaamwoord *zich*, resp. *mij*, *u* en *ons*, alleen maar een vorm is, die de nederlandse taalregel eist, maar die logisch absoluut overbodig is, in Esperanto dus onbestaanbaar.

Hieronder laten we alle werkwoorden volgen, die in het Nederlands wederkerend zijn naar de vorm, met hun respectieve vertalingen:

zich abonneren	= aboni	zich spoeden	= rapidi (hasti)
„ beklagen	= plendi	„ verbazen	= mir(eg)i
„ erbarmen	= kompati	„ verbeelden	= imagi
„ gedragen	= konduti	„ verblijden	= ĝoji
„ haasten	= rapidi (hasti)	„ vergissen	= erari
„ herinneren	= (re)memori	„ verheugen	= ĝoji
„ inbeelden	= imagi	„ vervelen	= enui
„ ontfermen	= kompati	„ verwonderen	= miri
„ ontwikkelen	= evolui	„ voorstellen	= imagi
„ schamen	= honti	„ werpen op	= impeti

Graag zouden we hieraan nog toevoegen *zich aanmatigen* = *arogi*, ware het niet, dat Zamenhof door het schrijven van *arogi al si* blijk heeft gegeven, dat hij aan *arogi* zonder *al si* niet dezelfde waarde toekent. Ons komt het echter voor, dat *arogi* hetzelfde karakter heeft als bijvoorbeeld *imagi*, waarvoor velen ook dikwijls *imagi al si* schrijven. (Wordt vervolgd).